

Epizodo pri la komuna tradukado de “La Zamenhof-Strato”

Aoyama Tooru

La tradukita libro, ザメンホフ通り, “La Zamenhof-Strato” estis eldonita de la komerca eldonejo, Hara-syobou kaj vendiĝis en libro-vendejoj tra la tuta Japanio.

La projekton iniciatis s-ro Kobayasi Tukasa en 2003. La aŭtoroj de la originala libro estas Roman Dobrzyński en Pollando kaj Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof nun loĝanta en Francio.

La libro temas pri intervjuo de Dobrzyński al Zaleski, verkita origine en la pola lingvo kaj poste en Esperanto.

Zaleski estas nepo de L.L.Zamenhof kaj enfermita en getto fare de nazioj, sed feliĉe li povis eskapi el la getto.

En la libro aperas la avo, L.L.Zamenhof, ideo kaj kreado de Esperanto, homarano, la fako de Zaleski, arkitekturo ktp.

Por traduki la libron el Esperanto en la japanan lingvon partoprenis 67 samideanoj. Por kolekti la tradukitajn manuskriptojn ni uzis retleteron. La retlisto kaj la hejmpaĝo estis nove farita por finfari la tradukadon.

Artikolo pri la procedo kaj la maniero de la kolektiva traduko aperis en la tagĵurnalo Asahi.

En januaro de 2005 eldoniĝis la libro, kaj kelkaj ĵurnaloj afable komentis pri la libro.

Pro la projekto, Esperantujo aktiviĝis, kaj la libro estis amase eksponita por vendi en kelkaj grandaj librovendejoj.

Zaleski fariĝis inĝeniero pri arkitekturo, kaj venis al Japanio kiel konsilisto por konstrui la Ponton inter Tyugoku kaj Sikoku. Ekde la 1960-aj jaroj li loĝas en Francio.

Li plurfoje salutis en UK-oj, sed jam li estas maljuna (li naskiĝis en 1925) kaj nun aliaj koncernatoj de Zamenhof salutas anstataŭ li.

La nova jaro 2017 estos 100-a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof.

Ni rememoru la ideon de la kreinto de Esperanto kaj ni strebu por monda paco pere de Esperanto..

